# Svisa Esperanto-Societo informas

**1997 numero 3a: majo 15a ĝis aŭgusto 15a**

Redakcio: Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5
☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

# Vivo de SES

## Salutas la prezidanto

La 15an de marto la Ĝenerala Kunveno disvolviĝis en Berno kiel konklavo: oni serĉis novan estron kaj ne sciis, kiu akceptos piloti la ŝipeton S.E.S. ĝis la mistera jaro 2'000. Pro aliaj gravaj taskoj en la movado Perla MARTINELLI volis strikte fordoni sian respondecon. La komitato prezentis liston de 7 kandidatoj, inter kiuj ankaŭ mi. La kunveno aplaŭdis konfirme kaj la nova estraro retiriĝis por atribui la funkciojn. Kontraŭvole mi eliris tiun unuan kunvenon kiel prezidanto, kiel ofte jam okazis en tiaj situacioj.

Claude GACOND forlasis memvole la estraron, sed li aktivas plu kiel redaktoro de **"S.E.S. informas"** kaj kiel komisiito por la **Agado 2003**. Li plenumas ankaŭ la funkcion de arkivisto de C.D.E.L.I. en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds kaj finfine meritis iun malŝarĝon, kaj kompreneble dankon.

Same niaj dankoj iras al Tazio CARLEVARO, kiu ankaŭ memvole retiriĝis el sia funkcio de vicprezidanto pro troa profesia aktiveco. Sed li daŭrigas sian utilegan helpon por la perkomputila adresado de **"S.E.S. informas"**.

Mi estas malnova kaj nova prezidanto. Ceramika memoraĵo kun la bildo de ZAMENHOF montras, ke mi organizis la S.E.S.-tagojn 1959-ajn en Bielo kaj oficis dum tiu periodo kiel prezidanto. Poste mi estis longtempe pasiva esperantisto pro profesiaj kialoj. Kiel jardekoj pasas! Kaj tiu homo devus gvidi la societon al nova jarcento! Se ia paralelo ekzistas inter la konklavo kaj mi, tio estas la aĝo de la rolantoj. Foje ankaŭ maljunaj papoj donis novan dinamikon.

Mi neniel serĉis postenon, sed nun mi havas ĝin kaj volas ekagi. Hodiaŭ mi estas pli realista, siatempe mi estis tro idealista. Laŭ ĉina proverbo ni ŝanĝu tion, kio estas ŝanĝebla kaj lasu tion, kio ne

estas ŝanĝebla kaj distingu unu de la alia.

La ĝenerala kunveno frustre tuŝis min. Kie restas la membroj kaj la junuloj? Ĉu S.E.S. troviĝas en letargio? Mi esperas, ke eblos revitaligi la societon, paŝon post paŝo, kunlabori efike kaj eviti kverelojn. La estraro tiros la ĉaron celkonscie helpata de vi ĉiuj, mi esperas. Kuraĝon kaj saluton!

Bruno GRAF, prezidanto.

## Donacoj

En tiu ĉi **"SES informas"** kaŝiĝas poŝt-pagilo, por ke ĉiu povu malavare esprimi sian apogon al la poresperanta laboro de S.E.S. Niaj donacoj fortikigu nian societon kaj kuraĝigu ties novan Estraron.

## La nova Estraro

Jen la konsisto de la nova Estraro:

**Bruno GRAF**, prezidanto. Im Park, Jurastr. 23, 3063 **ITTIGEN**. ☎031 921 44 59.

**Perla MARTINELLI**, vic-prezidanto. B.P. 237, 6830 **CHIASSO** 1. ☎0039 22 04 35 50.

**Nicole MARGOT**, romanda reprezentanto. Ch. des Lys 4, 1010 **LAUSANNE**. ☎021 653 14 67.

**Nicole BÉROUD-FOCKE**, membro. PF 103, 4005 **BASEL**. ☎ 0049 76 214 57 12

**Anĝelo MELLINI**, alemana reprezentanto kaj sekretario. Büntacher 21, 5626 **HERMETSCHWIL**. ☎ 056 633 33 85.

**Ernst VON MAY**, kasisto. Flurstr. 81 B, 9242 **OBERUZWIL**. ☎071 951 61 30.

**Barbara POCHANKE**, membro. Lettenstr. 70, 9500 **WIL**. ☎071 911 68 30.

La adreso de S.E.S. estas tiu de la prezidanto. La jura adreso restas ĉe C.D.E.L.I.

## Kunsido de la Estraro

La nova Estraro kunvenis la 26an de aprilo en Berno por organizi la kunlaboron, plani la agadon kaj solvi problemojn.

La informa servo por la gazetaro ne funkcias, ĉar Tazio CARLEVARO ne povas plenumi ĝin pro profesiaj kialoj. Ni serĉas novan koncepton kaj kunlaborantojn. Ni devas nepre montri al la publikaj medioj, ke esperanto vivas.

Ni diskutis la financan situacion de la societo, kiu ne estas malbona, sed jarfine ree montras perdon. S.E.S. bezonas pli da mono por la informado kaj varbado. La abono de Argus forprenas 25% de la kotizoj kaj ne indas, kiam la gazetara servo ne funkcias. Ni serĉas eblecojn por pliigi la enspezojn sen altigi la kotizojn.

Claudia GESSLER, invitita kiel gasto de la Junularo Esperantista Svislanda, prezentis la aktivecojn kaj planojn de J.E.S. La Estraro

decidis pri subvencio al la lastjara deficito kaj pretas subteni kurantajn projektojn. J.E.S. disponas pri modernaj varbiloj. La Estraro deziras havi regulajn reciprokajn kontaktojn okaze de estrarkunsidoj kaj laborkunvenoj.

La prezidanto konstatas, ke S.E.S. ne havas sufiĉe aktualan varbmaterialon. Ni esploros konsulte kun lokaj grupoj, ĉu eblas uzi kaj adapti ekzistantajn varbilojn kaj informilojn.

Cetere la Estraro planos strategion por la trijara mandato kun celoj kaj agadoj lige kun la kampanjo 2000 de U.E.A. Ni faros limigitan enketon analizan por ekkoni la bezonojn de la membraro kaj envolvi la grupojn en tiu procedo. S.E.S. volas plibonigi la ĝeneralajn kondiĉojn, por ke la grupoj kaj membroj povu agi pli efike kaj sukcese.

# S.E.S. informas

**Sciigoj pri "S.E.S. informas":**

Claude GACOND plenumas sian redaktan funkcion en la oficejo mem de C.D.E.L.I. , kie li estas ĝenerale atingebla la matenon. ☎ 032 967 68 55. Hejme oni voku lin nur vespere post la 20.00. ☎ 032 926 52 32. Ĉiuj korespondaĵoj por "**S.E.S. informas**" direktiĝu al lia poŝtfako 5031, 2305 LA CHAUX-DE-FONDS 5.

La presado de "**S.E.S. informas**" okazas en la presejo de niaj samideanoj Christiane kaj Raymond POT SIXTUS en Ĝenevo. La dissendadon efektivigas la redaktoro mem el La Chaux-de-Fonds helpe de gluadresoj pretigataj de Tazio CARLEVARO en Bellinzona.

Eldoniĝas po 5 numeroj jare laŭ la ci-sekva kalendaro:

**Nro 1a** aperas je la 1a de januaro. La redakcia limdato estas la 20a de decembro.

**Nro 2a**: 1a de marto. Limdato: 20a de februaro.

**Nro 3a**: 15a de majo. Limdato: 5a de majo.

**Nro 4a**: 15a de aŭgusto. Limdato: 5a de aŭgusto.

**Nro 5a**: 1a de novembro. Limdato: 20a de oktobro.

Por faciligi la redakcian laboron la raportoj kaj informoj sendiĝu kiel eble plej frue. La limdatoj koncernas nur la lastminutajn sciigojn. "**S.E.S. informas**" fariĝu utila per siaj informoj kaj raportoj.

# Vivo de J.E.S.

Fine de 1996 aperis la dua volumo de ***Kompil'***, disko eldonita de ***Eurokka***. Kiel la nomo diras, ĝi entenas muzikpecojn de diversaj grupoj kaj kantistoj, de tre diversaj muzikistoj. En ĝi oni povas aŭdi same MICKE *(Amplifiki)* kiel f-inon BARLASTON! Ankaŭ kantas

diversaj "krokodilaj" grupoj, kiuj nur por tiu disko kantas esperante. Ankaŭ tie la stiloj estas plej diversaj (de tango ĝis *rap* kaj *hardcore*), same kiel la landoj.

Ĉar la eldonejo ***Eurokka*** ricevis subvencion por tiu disko, estas nuntempe granda kampanjo por ĝi en kelkaj eŭropaj landoj. Kaj junaj svisoj ankaŭ partoprenis en ĝi!

Gazetara komuniko estis sendita komence de marto al 49 lokaj radioj en Svislando. Ĝin akompanis jam preta mendokarto. Tuj du tagojn poste venis la unua peto pri intervjuo. Kaj ni eĉ ne havis ekzempleron de la disko! Sekvis kelkaj streĉaj tagoj, kiam indis serĉadi informojn pri *Eurokka*, venigi diskojn, trovi homojn por intervjuiĝi en la franca, angla kaj germana lingvoj...

Entute okazis intervjuo en tri radioj. Krome ses radioj mendis la diskon per nia karto. Ili ricevis ĝin kun la prezenta dosiero. Ni tre entuziasmiĝis pri tioma reago! Ŝajnas, ke esperanta muziko interesas la homojn pli ol la lingvo ĝenerale. Tia kampanjo povas okazigi iom da streĉo, sed vere indas!

Kun tiu disko estas sufiĉe ampleksaj informoj pri esperanto. Ĝi ja ĉefe celas montri al homoj, ke esperanto vivas kaj bele rezultas kante. Sed ĝi estas ankaŭ bona okazo por esperantistoj, kon-atiĝi kun novaj esperanto-artistoj! Ĉiu trovos ion por sia gusto.

La ***Kompil'*** mendeblas ĉe: **J.E.S. Marion BÉLISLE**, Serre 28, 2300 **La Chaux-de-Fonds.** ☎ 032 914 30 78. Prezoj: kasedo: CHF 22.- KD: CHF 32.- plus sendokostoj.

Marion GROSJEAN.

**Redakcia noto**: Ni esperas, ke ne nur junuloj mendos tiun ĉi diskon, sed ankaŭ olduloj informiĝemaj pri la muzikemo de la nova generacio.

# Vivo de T.E.J.O.

## Edukado al Paco

La revuo "T.E.J.O. Tutmonde" 1997-2 anoncas, ke de la 4a ĝis la 11a de oktobro okazos en La Chaux-de-Fonds T.E.J.O.-seminario pri la temo "Edukado al Paco". Interesatoj petu al C.D.E.L.I. kopion de la koncerna informilo.

# Vivo de I.L.E.I.

## Svisa I.L.E.I.-sekcio

La Svisa I.L.E.I.-Sekcio havos sian Ĝeneralan Kunvenon dimanĉe la 7an de septembro je la 14.00 en Cully kadre de la regiona semajnfino de S.E.S. Jam notu tiun daton instruistoj de io ajn kaj tiuj, kiuj instruas esperanton aŭ gvidas esperanto-grupojn. Ĉiu

estas bonvenaj! La jara kotizo estas CHF 20.- kaj la membroj ricevas la organon "Internacia Pedagogia Revuo".

Mireille GROSJEAN: sekciestro.

# Vivo de S.A.E.F.

S.A.E.F. tre atentas, ke la esperanto-revuoj, kiujn ĝi ricevas interŝanĝe per sia organo "Svisa Fervojisto" riĉigu la kolektojn de C.D.E.L.I. Ĝis nun okupiĝis pri la transsendo de tiu grava materialo al la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds Marianne KELLER en Vallorbe. Pro mal-juniĝo ŝi ne plu povis plenumi sian funkcion kaj ŝin anstataŭas Gertrud EGGENBERGER en Winterthur. Sian dankemon esprimas C.D.E.L.I al ambaŭ S.A.E.F.-aninoj.

# C.D.E.L.I

**Biblioteko de la Urbo, Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds.** ☎032 967 68 55. Fakso: 032 967 68 29.

**Pri la prizorgado de la gazet-artikoloj:** C.D.E.L.I. tre atente arkivigas ĉiujn artikolojn, kiuj iel mencias esperanton aŭ rilatas al la mondlingvaj problemoj. Gabrielle GACOND venas ĉiusemajne el Neuchâtel jam ekde pli ol 20 jaroj por ordigi la kolektitajn artikolojn, kiuj estas poste statistike pritraktataj. Kaj ĝuste tiu scienca analizado altiras esplorantojn: oni povas ricevi realan bildon pri la publika sinteno al esperanto kaj al interlingvistiko.

Se S.E.S. rezignas je la perado de Argus por kolekti la artikolojn, kie la vorto esperanto estas menciita, estas tre grave, ke ni nin organizu alimaniere por tiu agado. Tial ni alvokas ĉiujn legantojn de **"S.E.S. informas"**, por ke ili tuj sciigu al C.D.E.L.I., kiam ili vidis la vorton esperanto en artikolo, ĉu per la alsendo de la koncernaj gazet-paĝoj entenantaj la artikolon, ĉu per simpla poŝt-karto. Ili ĉiam indiku aper-daton de la artikolo, la ekzaktan nomon de la gazeto kaj ties redakcian lokon.

Antaŭdankas Claude Gacond.

# Movada vivo

## Basel

### Esperanto Societo Basel

PF 103, 4005 BASEL. ☎0049 76 214 57 12. Kunvenoj: 20.00 en Altersheim, Neubad.

**Maje 29**: En Singapuro kun Nicole BÉROUD.

**Junie 7/8: Trilanda renkontiĝo en Bazelo: Vidu la detalan informilon sur la paĝoj 6/7aj.**

**Junie 26:** Minigolf Bachgraben en Allschwill je la 19.30.

# Trilanda renkontiĝo en Bazelo

## 7./8. de junio 1997

Ni tre ĝojus se ankaŭ kelkaj svisaj esperantistoj el aliaj regionoj trovos la vojon al Bazelo. Ni klopodis organizi interesan programon dum kiu ankaŭ la amikeco ne malprofitas.
Por ke la restado ne fariĝu tro multekosta ni interkosentis, ke anstataŭ la tranoktado en multekostaj hoteloj ni ofertu tranoktadon private ĉe la bazelaj esperantistoj. Tamen, tiuj lokoj estas limigitaj kaj verŝajne ne sufiĉos. Ni rezervos pliajn lokojn en la junulargastejo. Kiu tamen preferas hotelon ricevos de ni hotel-liston por mem elekti kaj mendi ĉambron. Plia ebleco estas en la pensiono "Bergstübli" en DE-79594 Inzlingen, Germanio (proksime de la landlimo).

***Piknikо:*** Bonvolu kunporti vian piknikon por kradrosti. Aĵoj kiuj devas esti konservitaj en fridujo metu en aparta sako kun via nomo.

**Aliĝilon sendu al: Esperanto-Societo Basel, Postfach 103, 4005 Basel.**

------------------------- ✂ -------------------------

## *Aliĝilo*

(ĉiuj devas aliĝi) ĝis la 31-a de majo

Familia nomo: ..................................................................................

Individua nomo: ................................................ Tel.: ........................

Adreso: ...........................................................................................

Pkc: ...................... Urbo: ...........................................................

Dato: .............................................. Subskribo: ..............................

# Programo

Sabato

13³⁰ Renkontiĝo ĉe la badena stacidomo (atingebla de la svisa kaj franca stacidomo per tramo 2, kajo 3, direkto Eglisee.

14⁰⁰ Vizito de la Tinguely-muzeo (5.--)

16⁰⁰ Kafumado en la kunvenejo Altersheim Neubad

16³⁰ Prelego de Claude PIRON "Psikologiaj aspektoj de la monda lingvo problemo kaj de Esperanto"

18³⁰ Vespermanĝo en restoracio

20⁰⁰ Gitarludado kaj kantado kun Claude Piron

Dimanĉo

10⁰⁰ Vizito de la malnova urbo

11³⁰ Veturado al la piknikloko

12⁰⁰ Pikniko en Bettingen
Okaze de malbela vetero ni vizitos la zoologian ĝardenon.

***Trambileto:*** duonpreza trajnabo validas
alie prenu el la aŭtomato tagan karton (7.80)

Gastigado:
- O private ĉe Esperantisto (bonvolu rezervi rapide)
- O junulargastejo (27.--)
- O hotelo
- O mi ne tranoktas en Bazelo
- O pensiono "Bergstübli" en Inzlingen, Germanio unulita ĉambro DEM 40.--, dulita DEM 65.-- (bonvolu rezervi rapide)

Menuo:
- O Pizza (multspecaj, vi povas elekti) CHF 23.--
- O Tortelini al carne CHF 25.--
- O Scalopine di limone kun Spaghetti aŭ Pommes Frites CHF 28.--

Ĉiuj 3 menuoj kun miksita salato kaj glaciaĵo
Bonvolu ⊗ kion vi deziras.

**Aŭguste 28**: Feriaj raportoj.
**Septembre 25**: Invito en Inzlingen ĉe la familio FOCKE-BÉROUD.
**Oktobre 23**: Claude GACOND: Evoluo de esperanto dum cent jaroj per komparo de aŭtenta kaj pirona versioj de zamenhofa letero.

# Bern

## Esperanta printempo

Surprize komenciĝis esperanto-kurso en "Coop Freizeitcenter Bern" kun 5 partoprenantoj gvidata de Bruno GRAF. Tiu ĉi kurso estis anoncita en la programo de "Coop" sub la titolo **"Vi havas la libertempon, ni la programon!"** Kial ne, ĉar esperanto estas la plej ideala liber-tempa lingvo.

Jam antaŭ 8 jaroj Ueli HAENNI gvidis kurson ĉe "Coop" kaj la sekretario simpatie memoris pri tiu evento. Sed kiel trovi interes-otojn? Okazis informa leciono kaj aperis informoj en la taggazetoj. Mirinda intervjua raporto pri Perla MARTINELLI en "Bund" prestiĝ-igis esperanton. Ĉu do Berno re-esperantiĝas? Espereble jes!

# La Chaux-de-Fonds

## Esperanto-studo

En la salono de C.D.E.L.I, Biblioteko, pordo nord-orienta. ☎032 967 68 55.

**Maje 28 kaj Junie 11**: Studo kun Claude GACOND: 19.45: Komencantoj; 20.30: Legado de la romano "La longa vojo" de Richard Meye.

## Kultura Centro Esperantista

Postiers 27, 2301 LA CHAUX-DE-FONDS. ☎032 926 74 07.

**Maje 17/19**: Pentekosta migrado kaj invit' al japanesko kun Jacqueline POUX kaj Etsuko NAKAZAWA.
**Junie 28/29**: Kiel personeco sin strukturas kun Claude PIRON.
**Julie 22/27**: Preparo al la matur-eca ekzameno, literatura fako kun Perla MARTINELLI kaj Giorgio SILFER.
**Aŭguste 19/24**: Kiel organizi kongres(et)ojn kun Gian Carlo FIGHIERA kaj La Faraono de B. Prus/Kabe kun Tomasz CHMIELIK.
**Septembre 27/28**: La streĉo: kiel eviti ĝin kun Tazio CARLEVARO.
**Oktobre 25/26**: Eduko al la lud-teorio kun Reinhard SELTEN, Nobel-laŭreato.

# Genève

## Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎022 740 04 45. **Kunvenoj**: 18.15 en Restoracio Manora, Cornavin 4.

**Maje 23**: Studo kaj informado.

Laŭ la organo "Brasikfolio" 1997-2 ni estas informataj, ke

Ardachès kaj Madeleine aŭ Mad-Mevo STAKIAN festis la 60-an datrevenon de sia geedziĝo. Gratulojn kaj longan vivon ni deziras al ambaŭ. Ili havu ankoraŭ la ĝojon vivi kune dum multaj jaroj.

# Lausanne

**Laŭzana Esperanto-Societo**

PF 389, 1009 PULLY. ☎021 729 58 02

**Kunvenoj**: 20.30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo.

**Maje 24/25**: Narcisa semajnfino: tranokto en la ĉaledo "Notre Abri" je la alteco 1220 m super Les Avants en narcisa paradizo. Aliĝemuloj sin anoncu kiel eble plej frue ☎021 647 29 17 aŭ 079 210 89 50.

**Junie 4:** Publika debato kun Claude PIRON en Hôtel Continental je la 20.30: "Comment sortir de la pagaille linguistique? Par l'anglais, l'espéranto ou le multilinguisme.

La antaŭvidita ekskurso al Savojo estas prokrastita pro la elektoj en Francio.

**Septembre 6/7: Regiona Semajnfino de S.E.S. en Cully: Vidu la detalajn informojn je la paĝoj 10/13-aj.**

**Oktobre 6:** Prelego pri la U.K. en Adelaido.

Babila rondo en la hotelo "Continental" fronte de la stacidomo okazas ĉiumonate la 3an lundon. Maje 26, junie 16, septembre 15, oktobre 20.

**Raporto**: La kurso por komencantoj de la 12/13aj de aprilo renkontis tre pozitivan eĥon. Ĝin entuziasme partoprenis 12 lernemuloj instruataj de François RANDIN kaj Nicole MARGOT.

La biblioteka ordigado grupigas regule dekon da helpemuloj. La 7an de aprilo Andrée kaj Claude GACOND instruis kiel fortikigi la librojn helpe de travidebla biblioteka glupapero.

# Neuchâtel

**Esperanto-Societo Neuchâtel**

Prezidanto: Alfred WENGER, En Séraize 19, 2025 CHEZ-LE-BART. ☎ 032 835 25 20.

**Junie 6**: 15.00 **Posttagmeza stud-rondo** ĉe la prezidanto: a) Jarkunveno. b) Claude GACOND: Evoluo de esperanto dum cent jaroj per komparo de aŭtenta kaj pirona versioj de zamenhofa letero.

# Tiĉino

La Bellinzona Grupo ĉesis ekzisti.

## En Lugano pri la itala

La 15/16ajn de februaro okazis en Lugano la tradicia Kultura Semajnfino. S-ino DE LORENZI kompetente gvidis la bazan kurson

# Laŭzana Esperanto-Societo

INVITAS VIN POR

LA REGIONA SEMAJNFINO DE S.E.S.

LA 6AN KAJ 7AN DE SEPTEMBRO 1997
EN CULLY (APUD LAŬZANO)
HÔTEL MAJOR DAVEL.

PROGRAMO.

- GRUPO A:

KOMENCANTOJ - DEBUTANTS - ANFÄNGER - PRINCIPIANTI - BEGINNERS.
SONIA BRUN INICOS LA KOMENCANTOJN AL LA INTERNACIA LINGVO.

- GRUPO B:

LINGVA KURSO POR PROGRESANTOJ.
PROFESORO GVIDOS LA PROGRESANTOJN AL PERFEKTIĜO LEGA KAJ PAROLA.

- GRUPO C:

L.-L. ZAMENHOF KAJ JUDISMO. DOKTORO ZAMENHOF, KREINTO DE ESPERANTO, ESTIS PLI LIGITA KUN JUDISMO, OL ONI ĜENERALE KREDAS. LI SERIOZE AKTIVIS EN LA NASKIĜANTA CIONISMA MOVADO, KAJ EĈ VERKIS GRAMATIKON DE LA JIDA LINGVO.

LA MORTOTUKO DE TORINO ESTAS AŬTENTA. LA TORINA MORTOTUKO ESTIS DEKLARITA FALSA POST LA FAMA DATADO PERKARBONO14. SED JA LA DATADO ESTAS FALSA. CETERE, TEMAS ĈI TIE PRI HISTORIO KAJ SCIENCO, TUTE NE PRI RELIGIO.

ANDRE CHERPILLOD, AKADEMIANO, BONE KONATA DE ĈIUJ TRA SIAJ MULTNOMBRAJ ESEOJ KAJ VORTAROJ MEM ELDONATAJ, AKCEPTIS VIZITI NIN DUM NIA SEMAJNFINO. LIAJ INTERESOJ ESTAS TIEL VARIAJ KAJ ALLOGAJ, KE NI PETIS LIN TRAKTI DU. ĈU LI AKCEPTOS AŬ ĈU NI ĜUOS NUR PRI UNU EL TIU TEMO? NI ANKORAŬ NE SCIAS, SED CERTE TIU SEMAJNFINO PROMESAS MULTON.

## HORARO

**Sabaton, 06.09.1997**

| | |
|---|---|
| 14h.00 | MALFERMO DE LA AKCEPTEJO KAJ DE LA LIBROSERVO DE KCE EN LA HOTELO MAJOR DAVEL |
| 15h.30 | INAŬGURO |
| 16h.00 | PRELEGO, KURSOJ |
| 16h.45 | PAŬZO |
| 17h.00 | PRELEGO, KURSOJ |
| 17h.45 | PAŬZO |
| 18h.00 | PRELEGO, KURSOJ |
| 19h.00 | VESPERMANĜO |
| 20h.30 | DISTRA VESPERO. |

**Dimanĉon, 07.09.1997**

| | |
|---|---|
| 09h.30 | MALFERMO DE LA LIBROSERVO |
| 10h.00 | PRELEGO, KURSOJ |
| 10h.45 | PAŬZO |
| 11h.00 | PRELEGO, KURSOJ |
| 11h.45 | PAŬZO |
| 12h.00 | PRELEGO, KURSOJ |
| 12h.45 | FERMO DE LA SEMAJNFINO |
| 13h.00 | EBLECO DE KOMUNA MANĜO POR KIUJ DEZIRAS. |

## MENUO PROPONATA POR LA VESPERMANGO:

| | | Metu kruceton |
|---|---|---|
| Unua plado: | Bovidaĵa pasteĉo kun fungoj | ..... |
| Ĉefaj pladoj: | Fajne tranĉita bovidaĵo kun kremo<br>Kunbuteraj nudeloj<br>Laŭsezonaj legomoj | ...... |
| | aŭ | |
| | Lofia skalopo kun cerefolio (fiŝo)<br>Vaporkuiritaj terpomoj<br>Verda Salato | ..... |

## VEGETERANOJ:

| | | |
|---|---|---|
| Unua plado: | Krudaj legomoj de la sezono en salato | ..... |
| Ĉefa plado: | Envolvita legomkuko kun tomata pureo | ..... |
| | aŭ | |
| Unua plado: | Kunherba kapuĉino | ..... |
| Ĉefa plado: | Kunfunga rizo | ..... |
| Deserto: | Sezonfrukta parfeo | ..... |

| | | |
|---|---|---|
| Prezo: | Kompleta menuo kun 3 pladoj: | CHF 38.-- |
| | Menuo kun 2 pladoj: | CHF 30.-- |
| | Ĉefa plado laŭ elekto: | CHF 22.-- |
| Vegeteranoj: | Kompleta menuo kun 3 pladoj: | CHF 30.-- |
| | Menuo kun 2 pladoj: | CHF 25.-- |
| | Ĉefa plado laŭ elekto: | CHF 18.-- |

ORGANIZA SEKRETARIO:

NICOLE MARGOT, CH. DES LYS 4, CH-1010 LAUSANNE. TEL. (021) 653.14.67.

CIUJ PAGOJ SENDOTAJ AL POŜTA ĜIRKONTO 10-77957-3, N. MARGOT, LAUSANNE. VIA ALIĜO VALIDOS POST LA KONFIRMA PAGO DE LA KOTIZO, LA MENDO DE HOTELĈAMBRO POST ANTAŬPAGO DE CHF 50.-- AŬ CHF 30.-- EN MALMULTE KOSTA LOĜEJO. POR MENDI ĈAMBROJN KAJ SABATAN VESPERMANĜON, MI BEZONAS LA ALIĜILOJN ALMENAŬ POR LA 4A DE SEPTEMBRO.

..........................ALIGILO..............................

FAMILIA NOMO:.............................................

PERSONA NOMO:.............................................

ADRESO:...................................................

TELEFONO:.................................................

MI PARTOPRENOS EN LA GRUPO:...............................

| | PREZOJ<br>APROKSIMAJ POR LA HOTELOJ. | MENDOJ |
|---|---|---|
| KOTIZO (INFANOJ SENPAGE, STUDENTOJ, EMERITOJ CHF 20.-- PAROJ CHF 60.--) | CHF 40.-- | ...... |
| **LOĜADO EN CULLY, KUN MATENMANĜO:** | | |
| -UNULITA ĈAMBRO KUN DUŜO | CHF 110.-- | ...... |
| -DULITA ĈAMBRO KUN DUŜO | CHF 150.-- | ...... |
| -KAMPADEJO | PAGO SURLOKA | |
| **PENSIONO EN LAUSANNE.** (PROKSIME DE LA STACIDOMO. NEAŬTOMOBILISTOJ ESTOS KONDUKOTAJ): | | |
| -UNULITA ĈAMBRO (DUŜO KAJ | CHF 55.-- | ...... |
| -PLURLITA ĈAMBRO NECESEJO | CHF 85.-- | ...... |
| -MATENMANĜO SURETAĜE) | CHF 6.50 | ...... |
| VESPERMANĜO ELEKTITA | CHF ..... | ...... |

DATO..................                    ENTUTE ......

RIMARKOJ:                    SUBSKRIBO:.................

PER AŬTOMOBILO: FORLASI LA AŬTOVOJON EN LAUSANNE AŬ EN VEVEY, UZI LA LAGBORDAN VOJON, EL LAUSANNE DIREKTEN VEVEY, EL VEVEY DIREKTEN LAUSANNE.

PER TRAJNO: EL LAUSANNE UZI LA REGIONAN TRAJNON DIREKTEN VEVEY. EL VEVEY UZI LA REGIONAN TRAJNON DIREKTEN LAUSANNE.

LA HOTELO MAJOR DAVEL SITUAS TUTBORDE DE LA LAGO.



de esperanto al interesata grupo de lokaj itallingvaj komencantoj. La mezan kurson gvidis alterne Alain FAVRE kaj Nicole MARGOT, bedaŭrinde kun malmultaj partoprenantoj. Feliĉe la ĉeestantoj multe profitis pro tiu malgrandnombreco.

Ankaŭ tre malmulte vizitata estis la prelegserio por la spertaj esperantistoj, kiun gvidis elstara itala matematikisto kaj beletristo, denaska esperantisto, akademiano, kaj universitata profesoro Carlo MINNAJA. Aŭtoro de multaj tradukaĵoj kaj de 1'400-paĝa itala-esperanta vortaro, li majstre priskribis la problemojn kaj la kaptilojn de tradukado, kaj prilumis la belojn, kiujn tamen eĉ tradukita poezio ebligas konservi.

La komunan vesperon ni pasigis en eksperimenta teatro, kie la esperantisto kaj profesia aktoro Giuseppe VALENTI speciale por la semajnfino prezentis elstaran unuhoran teatraĵon: "La mondvojaĝo en 79 tagoj", kiu amuzis kaj ĉarmis la ĉeestantojn (plenkreskulojn kaj infanojn), kiuj longe kaj varme aplaŭdis.

Restas demando: ĉu indas elspezi monon kaj energion por pretigi ion altnivelan, al kiu tamen nur unu alemano, unu romandino kaj kvar italoj partoprenis? Evidente ne, kaj tiu konkludo signifas almenaŭ nuntempe la finon de la kulturaj semajnfinoj en Lugano.

Tazio Carlevaro.

# WIL

## Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil. ☎071 911 68 30. **Kunvenoj**: 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

**Junie 11**: Ekskurso. Renkontiĝo sur la vilaĝplaco de Oberuzwil je la 18.00.

**Julie 9**: Temo elektota.

**Septembre 10**: 53a T.E.J.O.-Kongreso en Assisi (Italio) kun D. Pochanke.

**Septembre 13**: Tuttaga ekskurso. Petu la koncernan informilon.

**Oktobre 8**: 49a I.F.E.F.-Kongreso en Koŝice (Slovakio) kun G. Eggenberger.

# ZÜRICH

## Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH. ☎01 25 150 25 **Kunvenoj**: 19.15, Eisengasse 22, 8034 Zürich

**Maje 17/18:** Intensiva kurso por komencantoj.

**Maj 22/25:** Ekspozicio de Parzival pri mond-mono.

**Maje 26:** Lingvaj ekzercoj.

**Junie 9:** Monata Kunveno.

**Junie 30**: Parlamentanino Heidi Räbsamen el Lucerno, prezentos la projekton ekotopio.

**Julie 5:** Renkontiĝo en Hauptbahnhof je la 10.30 por ekskursi al Zugerberg.

## Stanislaw SKORUPSKI

La pola-esperanta poeto Jan Stanislaw SKORUPSKI (naskita 1938.07.18) nun vivanta en Zürich verkis dum la pasinta somero tiom da sonetoj, entute 732, ke li estis registrita en la Guines-rekord-libro pro la plej granda sonet-ciklo. Liaj poemoj, kiujn li skribas en la lingvoj pola, germana, rusa kaj esperanta estas verkitaj sur-baze de la principo, ke poezio estas unue parolata aŭ kantata, kaj nur poste skribata, kiel dum la kultura pratempo.

La 31an de januaro kaj 1/2ajn de februaro en la Teatro Stok Jan Stanislaw SKORUPSKI legis kaj kantis esperante, germane, pole kaj ruse ciklon da sonetoj. Lin piane akompanis Witold CZAJKOWSKI. Tiuj tri vesperoj estis tre sukcesaj.

# Libroj

François RANDIN eldonis plurajn informilojn. Inter ili ni aparte menciu la 25-paĝan broŝuron "**Le langage... un tabou? Alors parlons-en! Une réflexion à haute voix de François Randin**", kies inspiro estas la libro "Le défi des langues" de Claude PIRON.

Sekve al kolokvo organizita de "Institut de Recherches et de Documentation Pédagogiques" en Neuchâtel aperis en marto 1997 325-paĝa libro titolita "**Les langues et leurs images**. Textes réunis et présentés par Marinette MATTHEY." Inter tiuj kolokvaj prelegoj troviĝas la komunikoj pri esperanto de Claude PIRON: **"Idées reçues: l'exemple du chinois et de l'espéranto"** (paĝoj 141/145) kaj de Lilli PAPALOÏZOS: **"Représentation de la langue et de la communication en milieu espérantophone"** (p. 146/151). Samlibre legiĝas kontribuaĵo de Mireille GROSJEAN: **"Aspect linguistique des échanges de classes"** (p. 263/265).

La raporto **"Rapport de la Commission de la Bibliothèque, por la jaro 1996"**, publikigita de la Urbo La Chaux-de-Fonds, dediĉas la paĝojn 36/37ajn al la aktiveco de C.D.E.L.I. Interesatoj petu tiun raporton al C.D.E.L.I.

**P.P.**
CH-2305
La Chaux-de-Fonds 5

# Mortoj

Mortis **Mauricio DE SASSI** la 11-an de januaro 1997. Nekrologo aperos en venonta "SES-informas".

Mortis **Albert LIENHARDT** (1904-1996), konata ankaŭ sub la verkista pseŭdonomo Bernard THAILLET. La maljunaj SES-anoj bone memoras lin pro lia regula partopreno tre aktiva en la SES-aranĝoj, ĝis kiam mankis al li la forto forveturi el Mulhouse. Konatiĝinte 20-jara kun esperanto, li kreis post la dua mondmilito la eldonejon NOVA, kiu publikigis vortarojn, lerno- kaj lego-librojn kaj skrib-reformajn studojn. Nelacigeble li instruadis esperanton en ĉeestaj kursoj kaj per-koresponde, kio vigligis la movadon en Alzaco kaj Loreno. Lia plej sukcesa verko estas tutcerte *Amuzaj Dialogoj*, kiu helpis multajn komencantojn bone progresi en la parola uzo de esperanto. Li multe helpis min, kiam mi redaktis mian kurson korespondan por franclingvanoj, kontrolante kun efika atento ĉiujn lecionojn por elpeli el ili malĝustaĵojn leksikajn, gramatikajn kaj klarigajn kaj por proponi didaktikajn plibonigojn.

Claude Gacond.

# Anoncoj

Mi estas kvardekkvarjara inĝeniero multe interesita de via lando. Do mi turnas min al via societo kun espero trovi korespond-amik(in)on. Mi interesiĝas pri diversaj temoj. Korajn salutojn. Mia adreso: Jerzy MICHOLSKI, Pocztowa 9, PL 26-660 Jedlinsk, Pollando.

Ĉu vi estas denaske german-parolanto? Ĉu vi iam legis aŭ aŭdis fabelojn de Grimm? Ĉu vi pretas esti letere intervjuata? (Anonime kaj germanlingve) Personojn, kiuj donis 3 jesajn respondojn mi serĉas por esti materialo en mia diplomlaboro por la universitato de Helsinko. Volontuloj turnu sin al: Riitta Hämäläinen, Koskelantie 31 B 22, FIN-00610 HELSINKI, Finnlando.